

& Mortis Grabowski:

< Rekante 30 el 59 batoj por strofo, entute 649 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (1921) "je la naskotago de Zamenhof". Baladigis Martin Strid (2016) per nova melodio kaj rekantaĵo ĉerpita el Sinjoro Tadeo.>

(#Melodio:

<.59> (/fa fafa mimi faafafa mimi redo mimi; fa fafa mimi faafafa mimi fami rere; mi mimi fafa mimi mi mimi redo mimi; fa fafa mimi faafafa mimi redo mimi;

(#Rekantaĵe: fami re mido dodo TiTi dore mimi; fami re mido doododo fami re mi mi; fami re mido dodo TiTi dore mimi; fami re mido doododo Tire do La La)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 /Ho, rimoj Esperantaj, nun tintu kun esploro, ; Tra l' mondo portu grandan doloron voĉo via, ; Ĉar mortis via Majstro grandpova kaj genia, ; Per kiu vi pleniĝis de vivo kaj sonoro.

(×: (; **Lando de infaneco restos por ĉiamo, ; Sankta kaj pura, kiel unua ekamo.**)×2)

'2 Ho, Muzo Esperanta, en la angul' vi sidis, ; En vestoj senornamaj, al Cindrulin' simile, ; Li vestis vin per silko, vin perlornamis brile, ; Kaj prenis vin ĉe mano, kaj vin solene gvidis.

'3 En halon de la Arto, en templon de la Belo, ; Sur via lir' li streĉis arĝentsonorajn kordojn, ; Kaj li agordis ilin, ke frapu vi akordojn ; Pli muĝajn ol tempesto, pli dolĉajn ol mielo.

'4 Via patron' li estis, de li vi lernis iri, ; De li vi lernis flugi kaj svingi vin ĝisalte, ; Portate de la ritmo, facile, danco-salte ; Parnason de Popoloj vi povis venkakiri.

'5 Alarmis li: Tagiĝas! Por gajno de trofeo ; Batalon iru, rimoj! Akiru novan gloron! ; Kaj ili kun triumfo alportis la trezoron: ; Jen Esperante revas jam sinjoret' Tadeo!

'6 Kaj vi ektuŝis korojn kaj koroj ĝermis florojn! ; Printempo de poemoj en nian rondon venis, ; Kaj ĉiu versofloro lin benis kaj solenis: ; Honorojn al la Majstro, ho gloron kaj honorojn!

'7 Ho Muzo, kvazaŭ birdo, se ĝin la frosto tuŝas, ; Vi kun flugiloj lamaj funebras, mute, plore, ; La silkon kaj la perlojn deŝiras vi dolore, ; Ĵetite en angulon liuto via kuŝas.

'8 Ho, Muzo Esperanta, do ne sidadu mute! ; Se nun pro viaj larmoj eĉ malstreĉiĝis kordoj, ; Ekfrapu ilin tamen, eksonu la akordoj ; Obtuze, surde, ĝeme, funebre surliute.

'9 Doloron kaj funebbron sonigu, kantu krie, ; Pri la kruela bato de l' senkompata sorto, ; Ekmuĝos ĉiu sono ja kun milobla forto, ; Ĉar eĥos ĝin tra l' mondo la frataj koroj ĉie.

'10 Kaj se la kant' funebra forlarmis kaj forbruis, ; Relevu la flugilojn, denove ekflugiru, ; Ektuŝu novajn korojn, instigu kaj inspiru, ; Kiele vin la Majstro dum sia viv' instruis,

'11 Ke rimoj Esperantaj ektintu kun sonoro! ; Nur ili povas inde lin glori kaj memori, ; Nin li instruis verse ekridi, verse plori, ; Do estas ĉiu nova rim' ja lia nova gloro!